XXVII ORDINARA DIMANĈO – 4an de oktobro 2009

**LA HOMO NE DISIGU KION DIO KUNIGIS – Komentario al la Evangelio de p. Alberto Maggi. OSM**

**Mk. 10, 2-16**

**[En tiu tempo] Fariseoj venis, kaj demandis lin, por provi lin: Ĉu estas permesate al viro forsendi sian edzinon? Kaj li responde diris al ili: Kion Moseo ordonis al vi? Kaj ili diris: Moseo permesis skribi eksedzigan leteron, kaj forsendi ŝin. Sed Jesuo diris al ili: Pro la malmoleco de via koro li skribis por vi ĉi tiun ordonon. Sed de la komenco de la kreo: [Dio] faris ilin vira kaj virina. Tial; viro forlasos sian patron kaj sian patrinon, kaj aliĝos al sia edzino, kaj ili estos unu karno; sekve ili jam estas ne du, sed unu karno. Kion do Dio kunigis, tion homo ne disigu. Kaj en la domo la disĉiploj denove demandis lin pri la afero. Kaj li diris al ili: Kiu forsendos sian edzinon kaj edziĝos kun alia, tiu adultas kontraŭ ŝi; kaj se ŝi mem forsendos sian edzon kaj edziniĝos kun alia, ŝi adultas.**

**Kaj oni venigis al li infanojn, por ke li tuŝu ilin; kaj la disĉiploj admonis ilin. Sed Jesuo, vidinte tion, indignis, kaj diris al ili: Lasu la infanojn veni al mi; ne malhelpu ilin, ĉar el tiaj estas la regno de Dio. Vere mi diras al vi: Kiu ne akceptos la regnon de Dio kiel infano, tiu neniel eniros en ĝin. Kaj li prenis ilin en siaj brakoj, kaj benis ilin, metinte la manojn sur ilin.**

La verbo provi (πειράξω) aperas en la Evangelio laŭ Sankta Marko ekde ĝia komenco (1, 13), en la rakonto de la provoj en la dezerto kie Jesuo aperas provita de Satano, kaj poste, laŭlonge de la tuta Evangelio ĉiam tiu verbo estas en la buŝo de la Fariseoj (8,11), unu fojon kun la herodanoj. Estas ili la fanatikaj defendantoj de la religia ortodokseco, la fervoraj gardistoj de la tradicio, la instrumentoj de la diablo mem. Tiu estas la akuzo kiun lanĉas la evangeliisto.

Nun ni vidos tiun rakonton.

Fariseoj alproksimiĝis al Jesuo por provi lin. Kial por provi lin? Ĉar ili vidas ke Jesuo sin distancigas de la leĝaron kaj ili volas trovi ilon por Lin akuzi kaj poste por lin mortkondamni. La fariseoj kaj la herodanoj jam decidis ke ili devas elimini Jesuon.

Kio ili pridemandas Jesuon estas memkomprenebla kaj vaste konata afero, **: "**Ĉu estas permesate al viro forsendi sian edzinon aŭ ne"**.** Estas klare ke jes ja tio estas permesata, la tuta religia tradicio, konfirmita de la Vorto de Dio, tion permesas. Nu,

Jesuo sin distancigas de ĝi kaj li diras: ”Kion Moseo ordonis al vi?” Jesuo kiel hebreo estis devinta diri: ”Kion Moseo ordonis al ni?“; Jesuo distanciĝas.

La Dio de Jesuo estas Dio-amo kai la amo oni ne povas esprimi per leĝoj, sed nur per faroj kiuj komunikas la vivon. Jen kial Jesuo distanciĝas.

Kaj la respondo kiun ili donas ili prenas el la libro de la Readmono en la 24a ĉapitro (v.1), kiu diras ke Moseo permesis skribi eksedzigan leteron, kaj forsendi ŝin. Nu, ankaŭ ĉi tie ĵesuo distanciĝas kaj ilin akuzas: ”Pro la malmoleco de via koro li skribis por vi ĉi tiun ordonon”. Por Jesuo ne ĉio kio estas skribita en la leĝaro kaj al kiu oni atribuas dian aŭtoritatecon, havas vere ĝin, parte ĝi reprezentas cedon al malvirtaj homaj reagoj.

Kion Jesuo estas diranta estas grava afero ĉar oni antaŭvidis mortopunon por tiuj kiuj kuraĝis aserti ke eĉ ununura parto de la leĝaro ne estis dirita de Dio, kaj ke estis Moseo kiu tion skribis. Nu, por Jesuo la skribita leĝo ne ĉiam reflektas la volon de Dio, kaj pro tio ĝi ne daŭre kaj porĉiame valoras.

Kaj Jesuo ne referencas al leĝdonanta Dio de Moseo, sed Li referencas al Dio de la kreo, kaj li citas la libro de la Genezo (1, 27; 2, 24), kie estas skribite ke Dio faris ilin vira kaj virina – la kreo – “ viro forlasos sian patron kaj sian patrinon, kaj aliĝos al sia edzino, kaj ili estos unu karno”. Tiu estas la signifo de la geedziĝo .

En ĉiuj kulturoj la patro indikas kiu donas la sekurecon, la protekton, la patrino estas la senkondiĉa amo; nu, la geedziĝo signifas esti trovinta en alia homo sekurecon eĉ pli grandan ol tiun de la patro mem kaj senkondiĉan amon pli fortan ol la patrinon mem. Kiam ekzistas tio oni kuraĝas forlasi sian devenan familion kaj unuiĝi al alia homo, al la partnero, kaj fariĝi unu karno, t.e. unu sola estaĵo.

Pro tio Jesuo diras ke oni ne povas disigi kion Dio kunigis. Du homojn oni povas disigi sed kiam oni estas ununura oni ne povas disiĝi, krom se oni sin tranĉas.

Nu, la disĉiploj, kompreneble, malkonsentas je tiu restrikta vidpunkto de Jesuo kaj “en la domo la disĉiploj denove demandis lin pri la afero”. Kaj Jesuo tion konfirmas ĉar Li ĉiam defendas la pli malfortan flankon de la socia medio, Li ĉiam sin metas je la pli malforta flanko. En tia situacio oni venigis al li infanojn knabojn**,** (παιδία), kaj la disĉiploj Lin riproĉas ĉar ili ne volas ke Jesuo akceptu ankaŭ tiujn ĉi ulojn kiujn oni konsideras la nulojn en la socia medio, kaj, do tie ĉi oni permesas al Jesuo fari gravegan deklaron.

“Ne malhelpu ilin, fakte el tiaj estas la Regno de Dio”. La infanoj, la knaboj tiutempe estis konsideritaj sensignifaj estaĵoj, la lastaj en la socia medio, tiam al tiuj disĉiploj kiuj estas puŝitaj de la pretenda deziro esti la plej grandaj el ĉiuj, Jesuo rememoras ke la Regno de Dio, t.e. la komunumo kie Dio regas la homojn estas ĝuste tiu de la lastaj

el la socio. Do tiuj homoj kiujn oni konsideras kiel la lastajn, vere estos la unuajn kiuj eniros en la Regno de la Sinjoro.